Monato
je la unua rango

Dum la jaro 2007 la redakcio de *Esperanto aktuell* regule ricevis interŝanĝajn ekzemplerojn de gazetoj. Jen malgranda statistiko pri la surfaco de la paĝoj de la plej grandaj gazetoj.

Monato (Internacia magazino sendependa, Antverpeno, Belgio) estas je la unua rango. Sekvas *La Ondo de Esperanto* (Internacia sendependa magazino, Kaliningrado, Ruslando), *Sennaciulo* (Oficiala organo de S.A.T) kaj *Esperanto* (Organo de Universala Esperanto-Asocio). *Esperanto aktuell* (Organo de Germana Esperanto-Asocio) estas je la kvina rango.

Statistiko 2007

titolo	paĝoj	formato	m²
Monato	308	199x268	16,4
La Ondo de Esp.	268	205x290	15,9
Esperanto	264	188x266	13,2
Sennaciulo	176	210x296	10,9
Esperanto aktuell	160	210x297	10,0

La redakcio de *Esperanto aktuell* (Pf. 1539, 82355 Weilheim) dankas al ĉiuj redakcioj, kiuj sendis interŝanĝajn ekzemplerojn de iliaj gazetoj. La gazetoj estas kolektataj en Aalen, kie troviĝas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj en Germanio.

red.

Gazetoj kaj informiloj
en Germanio kaj Aŭstrio

En *Esperanto aktuell 2007/3* estis alvoko al eldonistoj de gazetoj kaj informiloj sendi informojn pri ili al la redakcio. Nur unu eldonisto reagis: Benoît Philippe el Saksio. Krome la redakcio regule ricevas kelkajn informilojn. Jen la listo de la gazetoj en alfabeta ordo.

Bulteno – Aŭstria Fervojisto
Organo de la Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio (AFEF), aperas laŭ propra indiko „laŭeble trifoje po jaro“. Formato DIN A 4, 12 paĝoj, parte koloraj. Herausgeber: Österreichischer Eisenbahner-Esperanto-Verband, ÖES-Freizeitanlage Wien Süd, Wien 10, Wiedner Gürtel 1B, Postfach 58, 1103 Wien.

Esperanto aktuell
Organo de Germana Esperanto-Asocio (GEA) en kunlaboro kun Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF). Pf. 1539, 82355 Weilheim, 0700ALFREDSC. DIN A 4-formata gazeto, 28 paĝoj. 1400 ekzempleroj, dumonata; ĉefa celgrupo: membroj de GEA kaj AEF, abonebla ankaŭ de nemembroj.

Esperanto en Bavario
Bulteno de Bavara Esperanto-Ligo r.a. (BELO), Niederscheyerer Straße 102, 85276 Pfaffenhofen. DIN A 4-formata informletero, 6 paĝoj, trimonata. Eldonkvanto: 185 ekzempleroj. Celgrupo: membroj de BELO.

Esperanto Hamburg
Bulteno de la Hamburga Esperanto-Societo r.a., Klaus-Groth-Straße 95, D-20535 Hamburg, 040/2503065. DIN A 5-formata informilo, 4 paĝoj, du koloroj, dumonata.

Esperanto-Informilo
por Berlino kaj Brandenburgio. Oficiala organo de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj de Esperanto-Ligo Berlin. Zeppelinstraße 170, 14471 Postdam, 0335/535654. DIN A 5-formata informilo, 8 paĝoj, eldonkvanto: 200 ekzempleroj, monata.

Verda Saksofono
Organo de Saksa Esperanto-Asocio. Aperas ekde 2001; lingvoj: Esperanto, germana, soraba; ofteco: 3 numeroj jare; eldonkvanto: 200 ekzempleroj; celgrupo: Esperantoamikoj en Saksio kaj esperantistaj amikoj de Saksio; abonprezo: 6 eŭroj; abonadreso: Saksa Esperanto-Biblioteko, Pillnitzer Landstraße 25, 01326 Dresden, glizje@aol.com *Benoît Philippe*

Verdaj Saksofono kaj Triskelo
Kultura bulteno komuna al Saksa Esperanto-Asocio kaj Federacio Esperanto-Bretonio. Aperas ekde 2005; lingvo: Esperanto; ofteco: 1 numero jare kun speciala temo (2005: Esperanto kaj framasonismo, 2006: Vivo en kamparo, 2007: Kulinara arto); eldonkvanto: 1000 ekzempleroj; celgrupo: Esperantoamikoj en Saksio kaj Bretonio kaj esperantistaj amikoj de Saksio kaj Bretonio; abono: oni abonas jenan kulturan bultenon nur ekabonante aŭ la bretonan bultenon La verda triskelo (Esperanto/franca/bretona) aŭ la saksan bultenon Verda Saksofono (Esperanto/germana/soraba). *Benoît Philippe*